

La 8an de februaro 2015

Tragedio de la elementa lernejo Ookaŭa

Ekde la 25a ĝis la 28a de januaro mi vojaĝis al la marborda regiono de Toohoku, kiun atakis la cunamo en 2011. La ĉi-foja estis mia 28a vizito al tiu regiono. Jam fariĝis mia devo kaj tasko vidi kaj raporti, kio okazas en tiu regiono kaj kiel vivas la suferantoj. Do kiam mi havas liberan tempon, mi ne povas deteni min vojaĝi al la regiono.

Ĉi-foje mi vizitis jenajn urbojn, sed raporti ĉion ne interesos vin, eksterlandajn legantojn, do mia raporto temos pri la elementa lernejo Ookaŭa en la urbo Iŝinomaki de la gubernio Mijagi.



Kial okazis tiu tragedio ?

En la urbo Iŝinomaki troviĝas la elementa lernejo Ookaŭa. Tiun lernejon atakis la cunamo. La lernejo konsistis el 108 gelernantoj kaj 13 geinstruistoj. El tiuj, tiutempe, estis en la lernejo 78 gelernantoj kaj 11 geinstruistoj, kaj el tiuj mortis 74 gelernantoj kaj 10 geinstruistoj. Tiun

tagon la lernejestro ne estis en la lernejo por ĉeesti en la geedziĝa festo de sia filino.

Laŭ diversaj informoj, post la granda tertremo la geinstruistoj kolektis la gelernantojn en la sportejon kaj diskutis pri tio, kien ili fuĝu, kaj decidis, ke ili fuĝu al la digo de la rivero Kitakami, sed survoje la cumano atakis ilin kaj la plejparto mortis.

Post la tragedio la gepatroj de la mortintaj gelernantoj kritikis la urbon, ĉar la lernejo estis la municipa. La eduka komitato kritikis sin pro tio, ke ĝi ne antaŭvidis la alvenon de la cunamo al la lernejo. La urbo antaŭvidis, ke eĉ la plej granda cumano venos 3 kilometrojn enlanden. La lernejo situas 4 kilometrojn for de la maro, sed nur 3 metrojn alte super la marnivelo, kaj oni eĉ registris ĝin kiel rifuĝejon por la loĝantoj. Fakte en tiu tago vilaĝanoj venis al la lernejo kaj viktimiĝis. En tiu distrikto 428 homoj mortis inkludante la mortintajn gelernantojn kaj geinstruistojn. La skalo de la cunamo superis la imagpovon de la homoj, pro kio okazis tiu tragedio.

Tre originala konstruaĵo de la lernejo

Vizitante la lernejon la duan fojon, mi denove miris pro la originala konstruaĵo de la lernejo. Kutime konstruaĵoj de japanaj lernejoj estas kvazaŭ grandaj betonaj kestoj aŭ kaĝoj tute ne artecaj, sed vidu, kia estas/is la elementa lernejo Ookaŭa :



Certe la arkitekto, pri kiu nenie aperas informo, celis, ke la lernejo estu loko por la gelernantoj ĝui, ludi, lerni, kanti kaj krei libere. Ĉi-foje mi trovis, ke en la angulo estas eĉ amfiteatro. Kaj sur la muro estas pentritaj bildoj el la rakontoj de la verkisto Mijazaŭa Kenĵi (1896-1933), kiu naskiĝis en la regiono Toohoku, en la gubernio Iŭate, kaj bildoj de geknaboj en etnaj kostumoj.



En la dekstra flanko estas vortoj el lia poemo :

« Ni venku pluvojn, ni venku ventojn » kaj maldekstre estas frazo el lia eseo :

« Se ĉiuj homoj en la mondo ne estas feliĉaj, neniuj individuoj ne estas feliĉaj ».

Meze estas bildo el lia rakonto « Nokto de galaksia trajno ».

En la angulo de la sportejo estis nove konstruita cenotafo, sur kiu estis gravurita la lerneja himno :

« Geknaboj en Japanio en sakuroj, amikiĝu kun geknaboj en la mondo, havu fierecon, faru rondon, la gelernantoj de Ookaŭa ! »

Du mortintaj instruistoj en la lernejo

Mi estis certa, ke en tiu lernejo troviĝis bonaj instruistoj. En la libro « La grandega katastrofo : gelernantoj, vivo kaj estonteco » kompilita de la instruista sindikato de Mijagi aperas tri eseoj pri du mortintaj instruistoj.

Kara memoro de s-ro Sasaki Juuiĉi (57-jara)

S-ro Sasaki fondis “la klubon por vidi estontecon” kun siaj 5 kolegoj en 1987 kaj alvokis: “Nunaj lernejoj fariĝas pli kaj pli rigidaj. Ni kune diskutu kaj lernu, por ke la lernejo estu pli liberaj”. Li estis estimata de la kolegoj pro sia sicereco. Mi perdis tiun karan amikon, sed lia ideo kaj idealo plu vivas en mia koro. Mi estas feliĉa renkonti lin, kiu havis varman sangon de la demokratia edukado de la regiono Toohoku.

(Iŝigaki Joŝiharu de la elementa lernejo Kitamura)

Kara memoro de s-ro Sasaki Takaŝi

Kiam mi kaj s-ro Sasaki laboris en la elementa lernejo Iinogaŭa, ni fondis klubon « Sukkiri (leĝere) » por ke ni povu libere diskuti pri diversaj aferoj. En tiu agado 3 junaj instruistoj aliĝis al la sindikato. Amikeco inter li kaj mi pli fortiĝis kaj ni helpis unu la alian kiel kolegoj en la lernejo kaj kiel samideanoj en la sindikata movado. En lia funebro mi larmis kaj tuŝadis lian ĉerkon por varmigi lin, ĉar li mortis en malvarma akvo. Unu jaron poste mi povas akcepti lian morton, sed malĝojo neniam forlasas min. (Jamaguĉi Masatomo de la elementa lernejo Nakacujama)

En la japanaj lernejoj la dekstrema tendenco pli kaj pli fortiĝis kaj sufokas la demokratian edukadon. Multaj instruistoj kontraŭbatalas. Tiuj du estis batalantoj por demokratio, kaj certe gravaj motoroj en la elementa lernejo Ookaŭa.

Jen estas eseo de la edzino de mortinta s-ro Sasaki Takaŝi

Li dediĉis sin tre sincere al edukado. Ĉiam li laboris ĝue, ĉirkaŭate de bonaj kolegoj kaj bonej gepatroj. Hejme li estas tre bona patro kaj edzo, ĉiam zorgante pri mi kaj niaj gefiloj.

Post la katastrofo mia tempo haltis. Mi perdis ĉion, nian domon kaj karajn memoraĵojn, en la cunamo. Restas nenio rilatanta al mia edzo. Kiam mi imagas, kion li pensis en la lasta momento, mi fariĝas freneza pro malĝojo. Nun mi ne povas aŭdi lian voĉon, nek tuŝi lin.

Mi estas laca en klopodado. Mi nur flosas. Ŝajnas al mi, ke ĉio okazas fore kaj ĉio estas nereala. Mi havas neniun intereson pri ĉio, nek volas fari ion, nek volas iri ien. Kion mia edzo opinias pri mia nuna vivo? Nun mi ne povas aŭskulti lian opinion. Mi volas, ke li voku min eĉ de fore. Tio estas mia nuna deziro.

(S-ino Sasaki Kaori de la mezlernejo Sumijoŝi)

Malofto mi aŭdas, kiel fartas la kvar gelernantoj kaj unu instruisto de la elementa lernejo Ookaŭa, kiuj postvivis la la cunamon. Laŭ malmultaj informoj tiuj lernantoj postulas, ke la lerneja konstruaĵo estu konservata kiel atestanto de la tragedio, tamen certe ili suferas pro psika traŭmato, ĉar ili spertis teruron en la ondegoj kaj momente perdis preskaŭ ĉiujn amikojn. Tiu instruisto, kiu postvivis la cunamon, kaj la lernejestro, kiu forestis de la lernejo tiun tagon, restas en hospitalo aŭ hejme ankaŭ pro psika traŭmato.

Grandaj batoj al la koro de la pluivantoj

La nombro de la viktimoj de la katastrofo estis ĝis la 11a de septembro 2013 :

mortoj : 15883

malaperintoj : 2654

rilatantaj mortoj* : 2688

* mortoj dum aŭ post rifuĝado pro manko de medicinaj helpoj, sinmortigo pro malespero ktp.

Kiam homoj perdas siajn familianojn, precipe siajn gefilojn, tio donas grandan baton al ilia koro. Ofte pluivantoj fariĝas melankoliaj, sinkritikante kaj bedaŭrante pro la perdo. 20 mil mortoj signifas, ke ĉirkaŭ ili troviĝas minimume 200 mil familianoj kaj parencoj de ili kaj eble samnombraj amikoj kaj konatoj. Tiuj postvivintoj suferas pli malpli pro vundo en sia koro.

La 31an de januaro 2015 la ĵurnalo Fukuŝima Minjuu publikigis raporton pri la psika traŭmato de lernantoj esploritan de la Ministerio de scienco kaj edukado en majo 2012. Laŭ ĝi 20,3% el la enketitaj gepatroj en Fukuŝima kaj 12,9% en aliaj 7 gubernioj suferintaj pro la katastrofo trovis psikotraŭmatajn simptomojn en la agoj de siaj gefiloj (de 3-jaraj ĝis 18-jaraj). Laŭ la spertoj de la Granda Tertremo en Koobe en 1995 nur post 5 jaroj post la katastrofo malmultiĝis malnormalaj agoj inter la gelernantoj.

Laŭ esploro de la sindikato de la urbaj funkciuloj en la gubernio Fukuŝima, pro psika malsano

en 2011 262 homoj

en 2012 61 homoj

en 2013 75 homoj

en 2014 137 homoj

forestis de la laboro. Plimulte da ili loĝas en la marborda regiono de Fukuŝima, kie estas la nukleaj centraloj de Fukuŝima. La sindikato timas, ke pli multiĝos malsanaj funkciuloj pro longdaŭra nuklea akcidento. Oni ofte diras, ke psika malsano aŭ psika traŭmato aperas post 3-4 jaroj. La ĉi-supra rezulto atestas, ke tiu prognozo estas ĝusta.

Kio okazos al la gelernantoj, kiuj spertis la katastrofon ?

Nur en la gubernio Mijagi, al kiu apartenas la elementa lernejo Ookaŭa, 261 gelernantoj kaj 17 geinstruistoj mortis en la cunamo. Multegaj gelernantoj spertis teruraĵojn. Kiel ili fartos post unu jaro, du jaroj kaj tri jaroj ?

Kiel fartas s-ino Sasaki Kaori, edzino de forpasinta s-ro Sasaki Takaŝi? Kiel fartas ŝiaj gefiloj? Kiam la patrino estas en tiu psika stato, certe ankaŭ ŝiaj gefiloj suferas.

Konkrete subteni la suferantajn geknabojn estas grave, kaj tion faras diversaj organizoj, sed pli grave estas montri al ili esperplenan estontecon de Japanio, sed bedaŭrinde mankas espero al Japanio.

HORI JASUO